

## **Vrchlický Jaroslav (1853-1912)**

### **Vánoce (ze sbírky *Co život dal*)**

Hlas zvonů táhne nad závějí,  
kdes v dálce tiše zaniká;  
dnes všecky struny v srdci znějí,  
neb mladost se jich dotýká.

Jak strom jen pohne haluzemi,  
hned střásá ledné křišťály,  
rampouchy ze střech visí k zemi  
jak varhan velké píšťaly.

Zem jak by liliemi zkvětla,  
kam sníh pad, tam se zachytí;  
bůh úsměv v tvářích, v oknech světla,  
a v nebi hvězdy rozsvítíl.

A staré písňě v duši znějí  
a s nimi jdou sny jesliček  
kol hlavy mé, jak ve závěji  
hlas tratících se rolniček.

Můj duch zas tone v blaha moři,  
vzdech srdcem táhne hluboce,  
a zvony znějí, světla hoří -  
ó Vánoce! Ó Vánoce!

## Jaroslav Vrchlický (1853-1912)

### Kristnasko

*el la ĉeĥa tradukis: Jiří Kořínek*

Voĉ' sonorila neĝojn kronas,  
en for' ĝi softe perdas sin;  
en koro ĉiuj kordoj sonas,  
ĉar la juneco tuſas ĝin.

Se inter arboj nur ekventas  
glaci-kristaloj falas jen,  
de tegmentar' glacio pendas,  
kiel fajfiloj de organ'.

Ter' kvazaŭ florus lili-bedoj,  
teniĝas ĉie neĝtavol';  
fenestre lum', sur vang' ridetoj,  
ciele steloj laŭ di-vol'.

En ni malnovaj kantoj sonas,  
kun ili song' pri l' kripa bril',  
kaj ĉirkaŭ mia kap' alfonas  
sinperda voĉ' de koltintil'.

En beatec' anim' plezuras,  
suspir' profunda en la kor',  
sonoroj sonas, lumoj brulas -  
Kristnaska glor', kristnaska glor'!

Fráňa Šrámek (1877-1952)

## Prosinec

Po sněhu půjdu čistém, bílém,  
hru v srdci zvonkovou.

Vánoční země je mým cílem.

Až hvězdy vyplovou,  
tu budu blízko již.

A budu ještě blíž,  
až lesní půjdu tmou.

Tu ztichnu tak, jak housle spící,

a malý náhle, dětinný,

a v rukou žmoule beranici,  
včarován v ticho mýtiny

tu budu blízko již.

A budu ještě blíž,

svých slz až přejdu bystřiny.

Mír ovane mne, jak by z chléva,

v němž vůl a oslík klímají,

světýlka stříknou zprava, leva,

noc modrá vzlykne šalmají,

tu blízko budu již.

Ach, jsem tak blízko již,

snad pastýři mne poznají...

[Fráňa Šrámek](#) (1877-1952)

## Decembro

*el la ĉeĥa tradukis Rudolf Hromada*

Sur pura blanka neĝ' mi iros  
kun sonorila lud' en kor',  
al land' Kristnaska mi aspiros.  
Kaj post aper' de stela glor'  
proksimos jam la cel'.  
Proksimos pli la cel'  
dum iros mi tra arb-odor'.

Silentos mi - dormanta kordo -  
kaj kiel en la knaba temp'  
peltĉapon premos mi en tordo  
sub sorĉo de l' arbar-silent'.  
Proksimos jam la cel'.  
Proksimos pli la cel'  
post ĉes' de mia plor-torent'.

Min pac' alblovos, kvazaŭ stalo  
kun bov', azeno en proksim'.  
Jen ambaŭflanke lum-vualo,  
kaj ŝalmos blua nokta sin':  
Proksimas jam la cel'.  
Proksimas, aĥ, la cel',  
paštistoj eble konos min.

[ambaŭlingva sonregistraĵo de la poemo](#)

Jaroslav Seifert (1901-1986)

## Vánoční píseň

Jak ptáci zimomřiví v tom teskném příběhu,  
ti, které neužíví třpyt hvězdic na sněhu,  
my sešli jsme se snící nad lžičkou olova,  
kéž by nám mohlo říci nás osud doslova.

Když už se řítí v spěchu ten žaluplný děj,  
svíčičko na ořechu, hoř pro nás pomalej,  
ať zvučí trouby hlásné i zpěvy andělů  
dřív, než přijde smrt a zhasne  
náš dech ve svém pocelu.

A těm u sukní matek dej úsměv do oček,  
klín plný cukrlátek a hodně vánoček,  
když už se řítí v spěchu ten žaluplný děj,  
svíčičko na ořechu, hoř pro nás pomalej.

[Jaroslav Seifert](#) (1901-1986)

## Kristnaska kanto

*el la ĉeĥa esperantigis Rudolf Hromada*

Kiel la birda ar' frostiĝa en tiu trista mir-fabel',  
ar', kiun nutri ne suficias per bril' de neĝa stel-juvel',  
kunvenis ni por ree revi super fandita plumbo-pec',  
ho, povu ni de ĝi ricevi aŭguron pri la estontec.

Se jam sin rulas kun akcelo eventoj plenaj de dolor',  
ho kandelet' sur nuksa ŝelo, por ni pli lante brulu for',  
trumpet-sonoro nun necesos kaj kantoj de anĝela lir'  
antaŭ ol venos Mort' kaj ĉesos sub ties kiso nia spir'.

Rideton veku en okulo de tiuj ĉe patrina jup'  
bombonojn donu sen kalkulo kaj multon el Kristnaska kuk',  
se jam sin rulas kun akcelo eventoj plenaj de dolor',  
ho kandelet' sur nuksa ŝelo, por ni pli lante brulu for'!